

La 4an de oktobro 2013

Ĉu ni povos regi poluitan akvon ?



Ĉiun tagon mi aŭdas pri poluita akvo en la nuklea reaktoro n-ro 1 de Fukuŝima. En mia kapo pli kaj pli grandiĝas timo, ke ni ne povos regi poluitan akvon. Estos ebleco, ke fine TEPCO kaj la japana registaro rezignos regi ĝin, kaj sekve poluita akvo elfluados en la maron kaj poluados la tutan terglobon. Malsame kiel atombombo kaj hidrogena bombo oni ne povas reale vidi la teruran damaĝon, sed poluita radioaktiva akvo disvastiĝanta malrapide kaj nevideble en la maron certe pereos la tutan mondon.

Kvantego da poluita akvo

La nuklea centralo n-ro 1 staras sur la sabla tero kaj sub ĝi venas 800~1000 tunoj da subtera akvo ĉiun tagon. Ĝis nun TEPCO konservadas tiun akvon en akvakonservujoj, sed jam la spaco estas mankonta pro preskaŭ 1000 konservujoj.

TEPCO kaj la registaro planas konstrui glaciigitan termuron ĉirkaŭ la reaktoroj por malhelpi enfluiĝon de subtera akvo. Tiuj muroj estos 1,5 kilometrojn longa, pli ol 500 metrojn larĝa kaj pli ol 10 metrojn alta. Tiu tekniko estas uzata nur por glaciigi muron kelkajn metrojn longan, kiam oni konstruas subteran tunelon. Neniam antaŭe oni provis tiel grandskalan,

glaciigitan termuron. Krome, oni devos uzi tiun muron por la venontaj 30 ~ 40 jaroj ĝis fina malkonstruado de la reaktoroj. Dume oni bezonos kvantegon da elektro. La registaro diras, ke post du jaroj tiu muro finkonstruiĝos, sed neniu povas garantii, ke ĝi bone funkcios.

Difektiĝo de akvokonservujoj

Nun TEPCO konservas 435000 tunojn da poluita akvo en akvokonservujoj, tamen uzlimo de tiuj estas 5 jaroj. Krome tiuj estis fabrikitaj rapide kaj senzorge kaj enhavas salan akvon, tial multaj difektiĝos pli frue ol la uzlimo. Jam foje okazas likado, sed TEPCO ne havas utilan kontraŭrimedon. Pli ol du jaroj pasis post la akcidento kaj baldaŭ venos uzlimo al multaj konservujoj. Kion TEPCO povos fari ? Ĉu ĝi povos fari ion ? Mi ne kredas.

Alia granda timo pri tiuj konservujoj estas alia granda tertremo. En la tertremo ĉu tiuj ne difektiĝos pro kolizio inter si kaj pro tremego? Se tio okazos, Japanio finiĝos.

Ĉu ALPS utilos?

ALPS ne estas la nomo de la montaro en Eŭropo. Ĝi estas ekipaĵo, kiu kapablas forpreni 62 specojn de nukleaj substancoj el poluita akvo. Por solvi la akvo-problemon, ALPS estas ŝlosila, kaj oni komencis funkciigi ĝin, sed foje okazis problemoj kaj ankoraŭ ne laboras plene.

Krome, eĉ se ĝi bone funkcios, ĝi ne forprenos tricion, ĉar tiu kuniĝas kun akvo. Oni diras, ke tricicio estas malpli danĝera ol cezio kaj stroncio, sed ĝi estas nukleaĵo, kaj se ĝi eniras en la homan korpon kiel parto de akvo, ĝi damaĝos nian DNA-n.

Kion oni faros pri ankoraŭ poluita akvo kun tricicio? Forĵeti ĝin en maron estas unusola rimedo, tamen ĉu tion akceptos fiŝistoj kaj la internacia socio? Sekve restados kaj multiĝos kvantego da poluita akvo.

Ĉu troviĝos solvoj?

Iu proponas, ke oni uzu aeron anstataŭ akvon por malvarmigi la reaktorojn, Iu proponas, ke oni konstruu grandegan lagon en la maro antaŭ la centralo. Tamen mi neniam aŭdas, ke TEPCO kaj la registaro komencis serioze diskuti pri tiuj proponoj. La ĉefministro Abe, estante bonhumora post la venko pri la Olimpikoj, estas okupita pro aliaj negravaj aferoj, kaj la kabineto, ne rigardante la realon, insistas, ke poluita akvo estas regata en la haveneto apud la centralo.

La problemo de poluita akvo jam ne estas solvebla per la kapablo de Japanio. Nun estas tempo por peti helpon kaj kunlaboron de la tuta mondo.

Ĉu vi pardonos min?

Fontas akvo profunde en la montaro,
Vi subenfluas,
vartante fiŝojn,
nutrante rizplantojn kaj legomojn,
donante ĝojon al loĝantoj.

Kun ĝojo vi proksimiĝas al la maro,
Tie atendas vin malbelaj konstruaĵoj,
Kaj subite vi suferas pro nekonataj substancoj.
Vi ne scias, kio ili estas,
Kaj enfluas en la maron.

Fiŝoj ne scias,
Marherboj ne scias,
Balenoj ne scias,
Homoj scias, sed ne sentas,
Kaj ĉiuj malsaniĝas.

Mi estas maljuna,
mi baldaŭ mortos.
Tial tio ne gravas,
Sed kio okazos
al miaj gefiloj,
al miaj genepoj?
Mi ne povos morti trankvile.

Kara akvo,
Ĉu vi pardonos min?